

KRISTANA FRATARO

Oficiala Organo de la

INTERNACIA KRISTANA FRATARO

Redaktejo:

LA INTERNACIA KRISTANA FRATARO
21 MITCHELL ROAD, PALMERS GREEN, LONDON, N.13
ANGLUJO

Redaktoro: LIVINGSTONE JENKINS



TRIMONATA

JULIO 1947

N-RO 1

KARAJ GEFRATOJ,

Kiam la milito komencis, estis evidenta, ke multaj internaciaj societoj devis ĉesi ilian aktivecon, kaj la laborado de la "Interniario" (nia antaŭa nomo), tute haltis.

Kiam ĉesis la milito, kaj la aferoj rekomencis funkcii pli aŭ malpli normale, la demando venis, ĉu la Interniario devus refondiĝi?

Alilandaj leteroj rapide klarigis ke la ĝenerala sento estis favora al:

- (1) la rekomenco de nia laborado,
- (2) la aliigo de la nomo, ĉar la antaŭa nomo ne klarigis la celon de la Frataro.

La nuna nomo, INTERNACIA KRISTANA FRATARO sufiĉe montras la karakteron de la asocio.

FRANCISKO CURTO BASTÉ (Barcelona) volonte konsentis replenumi lian antaŭan servadon kiel Koresponda Sekretario, kiel li tre bone faris de post la plej fruaj tagoj de la Interniario.

REGINALD GILL (Sheffield) ankaŭ konsentis agi kiel Help-Sekretario.

La decido farita, ni do rapide komencis la refondigon, helpitaj de niaj antaŭaj spertoj kaj multaj eraroj. Nia Senpaga Disdonado de literaturo faciligis, dankon al la bonvoleco de nia estimata subtenintino PRISCILLA H. PECKOVER, ankaŭ per la donacoj de libretoj kiujn ni ricevis de la Friends' Service Council, la Home Service Committee, kaj de diversaj societoj kaj geamikoj. La helpo donita tre kuraĝigis nin.

Nia unua devo estis la enmeto de reklamoj en multaj Esperantaj gazetoj, kaj tio estis farita senpage kaj ni tre kore dankas al la Redaktoroj pro ilia tre amika helpo. Inter ili

DEAR FRIENDS,

When the war commenced it soon became evident that many international societies must cease their activities, and the work carried on under the name of "La Interniario" stopped completely.

At the close of the war when things began to function again in a more or less normal fashion, the question arose as to whether the Interniario should be refounded.

Letters from abroad soon made it clear that the feeling was general that:

- (1) the work must again go forward, and
- (2) that the name should be altered to INTERNACIA KRISTANA FRATARO in order to define its true aim and character.

FRANCISKO CURTO BASTÉ (Barcelona) volunteered again to fill the arduous post of Corresponding Secretary, a work he so ably performed in the Interniario from its earliest days.

REGINALD GILL also offered to take on the task of Assistant Secretary. Thus having decided to refound the work, we soon got going, with the knowledge obtained by past experience and many blunders. Our work of Free Distribution was made easy by the fact that, thanks to the generosity of our late supporter, PRISCILLA H. PECKOVER, we still have a considerable quantity of literature, chiefly Gospels and small Bible-parts. The Friends' Service Council also offered again to help in this effort, and encouraging assistance has also been received from various other Societies and friends interested in the spread of Christian literature.

Our first job was to get advertisements in various Esperanto gazettes, and this was done in nearly every case without expense, thanks to

estis la *Heroldo de Esperanto*, *British Esperantist* *La Espero* (Svisujo), *La Espero* (Svedujo), kaj aliaj, malpli konataj sed tre utilaj gazetoj. Al Ĉiuj ni estas dankema por ilia afableco kaj helpo.

Ankaŭ ni deziras esprimi nian dankon al tiuj nacilingvaj gazetoj kiuj enmetis sciigon pri nia laborado, ni speciale devas nomi la *Református Gyülekezeti Élet* (de Budapeŝto), kaj *Református Élet* (de Satu Mare, Rumanujo), por tiuj ni estas ŝuldantoj al niaj energiaj kunlaborantoj PAUL BALKANYI kaj JULIO CSAPÓ kiuj fervore penadas alporti taŭgan publikigon por nia Frataro.

Pere de la reklamoj kaj la disdonado ni jam faris multajn novajn kontaktojn kaj ankaŭ sciigis pri la nunaj adresoj de multaj malnovaj geamikoj kaj helpintoj. Bedaŭrinde multaj tre suferis dum la militjaroj, kaj kelkaj kiuj antaŭe donacis grandanime per tempo kaj mono, nun tute mizeriĝis. Tamen, estas tre mirinde kiel kelkaj kuraĝiĝas spite de ilia pasinta suferado. Tia estas nia malnova amiko COR. ODERKERK (Nederlando), li perdis tre multe kaj, kun lia familio devis daŭre forkuri de la Gestapo sed eĉ kiam li rakontas siajn aventurojn oni povas preskaŭ vidi lian ridetantan vizaĝon, kaj aŭdi lian ĝojegan ridadon. Kiel multe ni bezonas aliajn kiel li, kiuj povus alporti ĝojon en ĉi tiun malĝojan mondon. Mi kelkfoje pensas ke homoj kiel li povas fari plimulte da bono ol multaj tiel-nomitaj "pastroj". Inter aliaj nederlandaj amikoj, pri kiuj ni ĝoje sciigis, estis tiuj kiuj loĝas ĉe, aŭ proksime al Beverwijk. Nia amiko COR. DE BOER estis la unua kiu sciigis nin pri lia nuna bonfarto, sed ni tre kortuŝiĝis kiam ni legis pri la bedaŭrindaj mortoj de liaj tre amataj gepatroj dum la militado. COR. kaj lia frato revenis al ilia ŝu-vendejo ĉe Breestraat 33, kie mi (L. J.) trapasis multajn plaĉajn horojn dum pasintaj tagoj. Al C. E. DE BOER, liaj edzino kaj gefiloj, G. DE BOER, Ges-roj KOOMEN, kaj aliaj anoj de la malnova grupo de la INTERNIARO ni nun sendas niajn Tutkorajn Salutojn. Plezure ni konstatas nian kontakton kun K.U.N.E. La korespondado inter la I.K.F. kaj K.U.N.E. faciligos nian laboron en Nederlando. Ni dankas al S-roj HOMMES, DIJKSTRA, D. DE BOER, GEYTENBEEK kaj aliaj kiuj promesis ilian helpon.

* * * *

POLUJO. Nia malnova amiko PASTRO ADAM FURMANIK de la *Mariavitaro* bone trapasis la maltrankvilajn akvojn de la milito spite de liaj 80 jaroj nun pasintaj. Kun granda plezuro mi memoras kiel li renkontis min ĉe la Warszawa stacidomo je la 27a de Julio, 1931, kaj poste oferis tiel bonegan gastemon ĝis estis necese ke mi foriru al la Krakova Kongreso. Sed antaŭ mi atingis la Kongreson, mi devis viziti nian Polan Repezantanton STAN. BOGDANOWICZ ĉe WISLA. S. BOGDANOWICZ ankoraŭ helpas la Frataron laŭeble, sed nuntempe lia emerituro

the good will of the editors and owners of those papers. Amongst those were the *Heroldo de Esperanto*, *British Esperantist*, *La Espero* (Switzerland), *La Espero* (Sweden), and a few others. Short articles concerning the work of the I.K.F. have also appeared in several Christian gazettes, amongst which we should specially name: *Református Gyülekezeti Élet* (Budapest) and *Református Élet* (Satu Mare, Rumania). For these we are indebted to our valiant co-workers Paul Balkanyi and Julio Csapo, who leave no stone unturned to give our work a wide publicity.

From the distribution itself we have made many new contacts, and found out the addresses of many old members and helpers. Many have suffered very cruelly during the war years, and some who liberally gave of their time and money to our work are now in a complete state of destitution. On the other hand, it is wonderful how some can keep a cheerful heart in spite of all their past sufferings, such an one is our old friend COR. ODERKERK (Holland), he lost a great deal, and he and his family were continually fleeing from the dreaded Gestapo; but even whilst relating his many unpleasant adventures, one can almost see his smiling face and hear his happy laughter. Would that there were more like him to cheer this gloomy world. I sometimes think that such men and women do far more good than many so-called "preachers". Other Dutch friends we were glad again to hear from are those at, or near, Beverwijk. Our friend COR. DE BOER was the first to inform us of his escape, but we greatly grieved to hear that his beloved father and mother were unable to withstand the cruel conditions of the war. COR. and his brother have returned to their shoe-store at 33 Breestraat, where I (L. J.) have spent many pleasant hours in days gone by. To C. E. DE BOER, his wife and family, G. DE BOER, P. H. KOOMEN and his wife, and to other members of the old "Inter Ni" group, we send our hearty greetings. We are pleased to have been able to contact the K.U.N.E. (Christian Union of Dutch Esperantists). Correspondence between the I.K.F. and K.U.N.E. has led to a good deal of friendly co-operation in our joint efforts in the Netherlands. We wish to express our thanks and greetings to S-roj HOMMES, DIJKSTRA, D. DE BOER, GEYTENBEEK and others who have promised their help.

* * * *

POLAND. Our old friend of the *Mariavitaro*, PASTRO ADAM FURMANIK, has managed to wade through rough waters in spite of his now having passed his 80th birthday. How pleasant I find it to recall the way he met and embraced me on Warsaw station on July 27th, 1931, and afterwards offered such wonderful hospitality, until it was necessary to travel on to Krakow for the Esperanto Congress. But before I reached Krakow, there was a short stay to be made at the home of our Polish representative, STANISLAW BOGDANOWICZ (Wisla). S. Bogdano-

tute ne sufiĉas, eĉ kun la aldono de la fruktoj de lia malgranda bieno. Bedaŭrinde lia bovino mortigis pro manko de taŭga manĝaĵo.

* * * *

GERMANUJO. Ni ankoraŭ atendas novaĵon de niaj malnovaj kunlaborintoj S-roj, T. W. TEICH kaj GEORG KROLL, se iu ajn povas sciigi nin pri ili, ni petegas ke vi bonvolu skribi al ni. Ni jam kontaktis tri aliajn helpintojn, FRIEDRICH HELFERS, KURT SCHMIDT kaj W. DUREGGER. Willy Duregger perdis preskaŭ ĉion pro la milito, sed ni ankoraŭ memoras kiel antaŭtempe li ĉiam estis preta malplenigi sian monujon por disjeti la Paroloj de Vero. De diversaj partoj de la Brita kaj Usona Zonoj ni ricevis petojn por literaturo.

* * * *

AUSTRUJO. Multaj kontaktoj faritaj, kaj sendube kiam interkomunikado estos pli facila, ni trovas en ĉi tiu kaj la najbaraj landoj tre taŭgan kampon por niaj laboroj.

* * * *

SVISUJO. Ankaŭ enhavas multajn kiuj konsideras ke la vivo estas tre serioza afero, ne por forigi ĝin freneze sole por plezuro, monĝajno kaj memimponeco. Ne estis hazardo kiu alcentrigis ĉe Genève tiel multajn grandajn movadojn kiuj celas por la socia kaj spirita progreso de l'homaro. Estas en Svisujo granda origino de spirita vivo simile kiel antaŭe troviĝis en Jerusalem, kiu disŝprucis al la Judoj dum multaj jarcentoj.

CÉSAR AMAUDRUZ konsentis fariĝi kunlaboranto por Svisujo, sed dum la somero li estas tre okupata pro lia montflanka bieno, do, bonvolu ne skribi al li ĝis la rikolto kolektiĝos. ERNST ANDEREGG-CHEVALLEY de Horn am Bodensee, Thurgau, bonvenigos viziton de Kvakeroj al lia hejmo, ĉar li deziras lerni plue pri GEORGE FOX kaj la Kvakerismo.

* * * *

FINNLANDO. La hejmo de multaj atletoj, havas krom amon por sporto kaj materia progreso, ankaŭ sopiradon por spirita evoluado. La helpo de la Kvakeroj donita en tiu lando, devigas la Finnojn pripensi tion kio instigas la Kvakerojn eniri aliajn landojn tiucele. Nia Kvakera Fako ricevas multajn petojn por ekzempleroj de *George Fox* and *La Kvakerismo*.

MARTTI J. PUTAALA estas nia Rezentanto por Finnlando kaj nia Kunlaboranto OLAVI PELTONEN ankaŭ helpas en la disdonado de nia literaturo.

* * * *

ĈEHO-SLOVAKUJO. Lando treege progresema, ĉiame posedis fortan spiritan fundamenton kaj amon por libereco. Leteroj el tiu

wicz is still working with us in spite of the fact that his State-pension (ex-schoolmaster) is now of scarcely any value. On his mountain-side home he tries to supplement his meagre income by utilising a few acres of very poor soil, and until recently he was able to get a bit of nourishment from his cow, but alas, that has died a victim of the lack of proper feeding stuff.

* * * *

GERMANY. We are still without news of our old friends and helpers, TH. WM. TEICH and GEORG KROLL. If this should meet the eyes of anyone able to give us information about them, we beg you to write to us. We have got in touch with three other old helpers, KURT SCHMIDT, FRIEDRICH HELFERS and WILLY DUREGGER. W. Duregger is one of those who have lost practically everything during the war; yet in the old days he was always ready to empty his purse to "scatter the Seed of Truth". We have also had a good number of requests for literature from various parts of the British and U.S. Zones in Germany.

* * * *

AUSTRIA. Some very interesting contacts have been made, and no doubt when things have settled down a bit, we shall find this and the surrounding countries a fine field for our labours.

* * * *

SWITZERLAND. Also contains many who consider that life is a serious business, and not to be frittered away in a mad rush for pleasure, profit and self-aggrandisement. It is not a mere accident that the great movements for spiritual and social progress have congregated at Geneva. There is in Switzerland a great source of spiritual life, in a similar way that Jerusalem gave forth to the Jews for many centuries.

CESAR AMAUDRUZ has consented to be one of our co-workers for that country, but during the summer he is kept busy on his mountain-side farm, so please do not write to him until the harvest has been gathered. ERNST ANDREGG-CHEVALLEY of Horn am Bodensee, Thurgau, would welcome a visit from Quakers at his home, he is very keen to learn more about GEORGE FOX and his teachings.

* * * *

FINLAND. The home of many notable athletes has, beside a love for sport and material progress, also a longing with many for spiritual advancement. The relief work carried on there by the British and American Friends has made them curious as to what it is that inspires the Quakers to penetrate to other lands in such a practical fashion. Many have written to our Quaker-section for copies of *George Fox* and

lando montras ke kuraĝo ambaŭe spirita kaj
mensa estas ankoraŭ kun ili treege forta. Al
ALOIS KUBALA, ANTON CHRAPAVY kaj aliaj
amikoj kiuj helpas nian laboradon, ni nun
dankas kaj sendas nian varman saluton. Kon-
taktoj estas daŭre faritaj kun amikoj novaj kaj
malnovaj en multaj landoj tra la tuta mondo.

Se vi deziras fariĝi Ano de ĉi tiu tutmonda
Frataro, plenigu la Anigilon kaj sendu ĝin al
la

Koresponda Sekretario: F. CURTO BASTÉ,
Martin Molins 24,
Barcelona 13,
Hispanujo.

aŭ al la *Help-Sekretario:* REGINALD GILL,
10 Pipworth Road
Manor, Sheffield,
Anglujo.

aŭ la LA CENTRA OFICEJO.

Tiuj kiuj deziras disdoni nian literaturon
povas ricevi provizon laŭ la jenaj reguloj:

1. se eble sendu sufiĉan monon por afrank-
kosto, poŝtmarkojn de iu ajn lando ni
akceptas;
2. sciigu nin pri la ricevo de la sendaĵoj;
3. sendu periode novaĵojn pri la disdonado;
4. nepre kaj ĉiam skribu nomojn kaj adresojn
klare kaj preslitere, aliflanke la kaŭzo de
nericevo estas la via kaj ne la nia.

Por ĉiuj ni petegas viajn preĝojn por ke la
Dia beno restu ĉiam sur nia laborado.

La Kvakerismo. MARTTI J. PUTAALA has been
appointed our Special Representative for Fin-
land, and OLAVI PELTONEN also acts as our co-
worker.

* * * *

CZECHOSLOVAKIA. One of the world's
most go-ahead countries has always had its
strong spiritual background and a love for
religious freedom. Letters from many show
that courage, both of soul and mind, is still as
strong with them as ever. Several are helping
in our distribution. To ALDIS KUBALA, ANTON
CHRAPAVY, and others who have sent such
encouraging letters, we now send our greetings.
Contacts have been made with friends old and
new in many countries including America,
Australia, and the Far East.

* * * *

If you wish to become a link in this unique
Chain of Friendship, fill up the Membership
Form. There are no fees, but help either by
literature or money for the expenses is wel-
comed from those in a position to do so.

With many thanks to all who have in any
way contributed to this effort. Accept my per-
sonal greetings.

Your friend and fellow-worker,

LIVINGSTONE JENKINS.

INTERNACIA KRISTANA FRATARO

Sekretario:

LIVINGSTONE JENKINS

21 Mitchell Road, Palmers Green, London, N.13

Koresponda Sekretario:

F. CURTO BASTE

Martin Molins 24, (Sagrera) Barcelona 13, Hispanujo

Help Sekretario:

REGINALD GILL

10 Pipworth Road, Manor, Sheffield, Anglujo